

20a ORDINARA DIMANĈO - 20an de aŭgusto 2017

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

VIRINO, GRANDA ESTAS VIA KREDO!

El la evangelio laŭ Mateo 15, 21-28

En tiu tempo Jesuo, elirinte el la regiono de Genezareto, foriris al tiu de Tiro kaj Cidon. Kanaana virino, kiu loĝis tie, iris al Li, insiste kriante: „Kompatu min, Sinjoro, filo de David! Mia filino estas terure turmentata de demono.“ Sed Jesuo respondis al ŝi eĉ ne unu vorton. Tiam liaj disĉiploj proksimiĝis al Li, petante: „Forsendu ŝin, ĉar ŝi sekvas nin kriante.“ Sed Li respondis: „Mi ne estis sendita krom al la perditaj ŝafoj el la popolo de Izraelo.“ Sed ŝi venis kaj genuiĝis antaŭ Li, ripetante: „Sinjoro, helpu min!“ Tiam Jesuo respondis: „Ne decas preni la panon de la filoj kaj ĵeti ĝin al la hundoj.“ Sed ŝi diris: „Jes, Sinjoro, sed ankaŭ la hundetoj sub la tablo povas manĝi la panpecetojn, kiuj falas de iliaj sinjoroj.“ Tiam responde Jesuo diris: „Virino, vere granda estas via kredo! Estu al vi, kiel vi volas.“ Kaj ekde tiu momento ŝia filino estis resanigita.

Kiam ni legas la evangeliojn, ni devas ĉiam distingi tion, kion la evangeliisto volas transdoni al ni, disde la maniero, en kiu li diras ĝin, utiligante literaturajn ĝenrojn, figurajn bildojn ne ĉiam kompreneblajn, kiel en la kazo de ĉi tiu peco, temas pri Mateo, ĉapitro 15, versikloj 21-28, la ŝoka epizodo de la rifuzo de Jesuo al virino angorplena pro la malsano de sia filino. En ĉi tiu kazo la evangeliisto utiligas tiun metodon, kiu estas esprimita per la dirmaniero "bati la sakon, por ke la azeno sentu", nome, ne diri rekte iun malagrabraĵon al la koncernato, sed alvenigi ĝin al li nerekte. Tio, kio sekvas, kaj kiun nun ni ekzamenos, ne estas kroniko, sed instruo, kiun Mateo donas al la disĉiploj de Jesuo, kiuj malemas kompreni la universalan amon de Dio al la homaro. Ne ekzistas privilegia popolo, ne estas prioritato por ni kaj poste la aliaj, sed estas la amo de Dio al ĉiuj. Jesuo estis provinta tion anonci, ricevante grandan kontraŭstaron, jam en la 8-a ĉapitro de ĉi tiu evangelio, post la epizodo de la centestro de Kapernaumo, kiun Jesuo laŭdas pro lia fido. Jesuo estis dirinta: "Vere mi diras al vi, ke ĉe neniu en Izrael mi trovis tiom da fido.", do Jesuo laŭdas paganon, paganoj estis abomenindaĵo en la tiutempa

pensmaniero, "Kaj mi diras al vi, ke multaj venos el la oriento kaj la okcidento," tio estas, el la paganaj popoloj, "kaj sidiĝos kun Abraham kaj Isaak kaj Jakob en la regno de la ĉielo," sed, kio estas plej grava, "la filoj de la regno", tiuj, kiuj opiniis havi la privilegion ricevi la unuajn lokojn en ĉi tiu festeno, "estos elĵetitaj en la eksteran mallumon". Do Jesuo anoncas, ke la amo de Dio manifestiĝos ankaŭ al la paganoj, kaj li trafas en grandan reziston fare de la disĉiploj, kiuj absolute ne volas akcepti tion. Do, ĉi tiu peco estas invito superi ĉi tiun antaŭjuĝon, ni vidu.

"*Jesuo, elirinte el la regiono de Genezareto, foriris*", Jesuo devas forkuri post la disputoj pri la religiaj tradicioj, kaj retiriĝas en paganan landon, "*al tiu de Tiro kaj Sidon. Kanaana virino*", tio estas fenica. Temas pri tiuj popoloj, kiuj laŭ la libro de Readmono, estis destinitaj al ekstermo, do popoloj malŝatataj, popoloj, kiuj havis neniun rajton, sed devis esti submetitaj kaj regataj, "*kiu loĝis tie, iris al Li, insiste kriante: „Kompatu min, Sinjoro, filo de David!*", en la evangelioj la peto de kompato al la Sinjoro estas tipa de la personoj, kiuj ne konas Jesuon. Neniam iu persono, kiu konis Jesuon, turniĝas al li petante kompaton, sed nur ĉi tiu virino kiu ne konas Jesuon, kaj la blinduloj. Kaj ŝi nomas lin "*filo de David!*", kiu estas la filo de David? Filo, ne estas tiom la naskito, kiom tiu, kiu similas la patron en la sinteno, ĝi estis la atendo de la tradicia mesio, la mesio, kiu, samkiel reĝo David, pere de perforto, pere de potenco, denove konkeros la regnon de Izraelo, regos kaj subigos ĉiujn paganajn popolojn. Jen kio estas la mesio, la filo de David. Sed Jesuo ne estas la filo de David, Jesuo estas la filo de Dio, li ne venas subigi perforte, sed venas proponi al ĉiuj la amon de la Patro.

"*Mia filino estas terure turmentata de demono.*" Sed Jesuo respondis al ŝi eĉ ne unu vorton.", nu, se ni interpretas tion kiel kronikon, aspektas stranga ĉi tiu sinteno de Jesuo. Kial Jesuo ne respondas al la virino? Ĉar la virino turniĝis al la filo de David, kaj Jesuo ne estas la filo de David, jen kial li ne respondas al ŝi. Jesuo volas inviti la virinon, sed samtempe li volas sendi nerektan mesaĝon al la disĉiploj, por ke ili superu ĉi tiun religian antaŭjuĝon, do li respondas al ŝi eĉ ne unu vorton.

"*Tiam liaj disĉiploj proksimiĝis al Li, petante:*", ne, elaŭdu ŝin, sed "*Forsendu ŝin*", ĝi estas la sama verbo utiligita en la epizodo de la kundivido de la panoj, kiam ili, havante neniun kompaton al la homamaso, volas ĝin forsendi. "*Forsendu ŝin, ĉar ŝi sekvas nin kriante.*" "*Sed Li respondis:*", li respondas ĝuste al la disĉiploj, por komprenigi al ili kaj helpi ilin superi ĉi tiun antaŭjuĝon, "*Mi ne estis sendita krom al la perditaj ŝafoj el la popolo de Izraelo.*", jen la filo de David, la regno de Izraelo, dum Jesuo, kiu estas la filo de Dio, venis alporti la regnon de Dio.

"*Sed ŝi venis kaj genuiĝis antaŭ Li, ripetante: „Sinjoro, helpu min!*", jam malaperis la filo de David, ĝi estas progreso en la fido de la virino kaj, samtempe, en la kompreno de la disĉiploj. Sed Jesuo insistas: "*Tiam Jesuo respondis: „Ne decas preni la panon de la filoj*", la filoj estas la elektitoj, tiuj, kiuj rajtas, "*kaj ĵeti ĝin al la hundoj.*", "hundo" estis malŝata esprimo per kiu oni indikis la paganajn popolojn. Kaj jen la kresko en la fido de la virino, kaj

samtempe de la kompreno fare de la disĉiploj: "*sed ankaŭ la hundetoj sub la tablo povas manĝi la panpecetojn, kiuj falas de iliaj sinjoroj.*", Jesuo volas respondi al antaŭjuĝo ĉiam tre aktuala: fronte al krizostataj situacioj estas iuj kiuj imponas per la slogano: unue ni, kaj poste la aliaj, tion ni vidas en la nuntempo: fronte al la problemoj de la forkurintoj, de la rifuĝintoj, de la migrantoj, fronte al seriozaj problemoj kiel loĝejo, laboro, sano, estas la imperativo: unue ni, kaj poste, se io superfluas, ankaŭ por la aliaj. Nu, la virino komprenas: ne, ĉiuj samtempe, eĉ nur la panpecetoj. Jesuo komprenis la fidon de la virino kaj, samtempe, la kreskon de la kompreno fare de la disĉiploj, kaj tio pretigas ne al la panpecetoj, Jesuo ne donos la panpecetojn, Jesuo pretigas sian disĉiplojn al la dua kundivido de la panoj, kaj ĉifoje, en pagana lando, ne la panpecetoj. Nu, tio, kion Jesuo volas komprenigi, estas, ke ne ekzistas privilegio, unue ni kaj poste la aliaj, sed ĉiuj samtempe abunde. Se tiel, oni liberigas sin de la antaŭjuĝoj.

Fakte finas la peco: "*Tiam responde Jesuo diris: „Virino, vere granda estas via kredo!*", dum Jesuo riproĉas siaj disĉiploj pro la manko de fido, de kredo, Jesuo laŭdas ĝuste la fidon de la paganoj, "*Estu al vi, kiel vi volas.*" *Kaj ekde tiu momento ŝia filino estis resanigita.*", sed kiamanere ŝi estis resanigita? Jesuo plenumis nenian agon super ĉi tiu virino, li ne forpelas la demonon, la granda fido de la virino forpelas la demonon, kiu estas la bildo de la religia antaŭjuĝo, kiu diskriminacias la personojn, kaj kiu estas en la kapo de liaj disĉiploj.